

Klaus Groth,  
Vespera paco

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Silentas mond-bruado,  
Samkiel dormus ĝi,  
Nek ploro nek ridado  
Aŭdeblas tie ĉi.

Samkiel infaneto  
Ensonge foliar'  
Parolas, lulkanteto  
Ĝi estas por ŝafar'.

Vilaĝo en mallumo  
Nun kuŝas kaj nebul',  
Aŭdeblas nur voĉumo  
De iu fora ul'.

Bovaro gres-manganta  
Aŭdeblas tie ĉi,  
Kaj eĉ lepor' dormanta  
Jen kuŝas apud mi.

Sen bruo, sen kverelo  
Nun preĝu ĉiuj ni.  
Jen paco de l' ĉielo -  
Nin aŭdu, kara Di'!

*Traduko de la Basgermana poemo "Abendfrieden" de KLAUS GROTH (\*1819-04-24 - †1899.06-01) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2012-05.*

*Arg-553-1184 (2012-09-03 11:23:04)*